
# katolika sento

3 JARO 54a U.E.C.I.

'75



**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

ks

**Anno 54° - 1975**

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

*Quota di abbonamento L.* **2500**

*Abonkotizo* *italliroj* **2500**

**KATOLIKA SENTO**
**n° 3**

54a Jaro Aprilo 1975

Okaze de la plej granda
soleno de la jaro, la
REVIVIĜO DE KRISTO,
ni tutkore transdonas
bondezirojn
al niaj karaj abonantoj,
alvokante sur ĉiujn
la riĉon de la diaj gracoj,
por ke ĉi tiu jaro
estu vere sanktiga,
laŭ la plano
de la senfina dia mizerikordo

# "ECCE HOMO!"

\+ + +

Antaŭ Pilat' Vi staris, Kristo, pro ni homoj,
kaj se Vi venus nun, travivus Vi la samon:
oni Vin batus, sangus Vi sub dorno-krono,
per lanco-pik' Vi spertus blindan hom-malamon.

Sed kia pens'! - Vi ĉie estas kaj sovaĝan
observas rondodancon. Ĉie krioj sonas:
"Jen, ami ĉiun homon ĉi strangul' ordonas,
tial ĝisoste vipu l' predikanton aĉan!"

Kaj vip' kruele tranĉas korpon Vian nudan,
preskaŭ en ĉiuj partoj de ĉi bunta mondo,
dum nokte ĉirkaŭ Vi rikanas amas-ondo.

Rikanas ĝi kaj kaptas turmentadon brutan
malicokule, kaj la soldatar' sen honto
pri Via vest' marĉandas stare en la rondo.

Jozefo Riječanin

# HOMILIO DE LA PAPO DUM LA JUBILEA MESO POR LA FAJREJANOJ

Junuloj Gen!
Ni salutas vin!
Ni akceptas vin kun malfermita koro!
kun granda ĝojo!
Estu bonvenaj, en la nomo de Kristo!
kiel filoj!
kiel fratoj!
kiel amikoj!
Ni nun estas sur la tombo de la apostolo Petro:
la apostolo elektita de Jesuo kiel bazo por konstrui super ĝi sian Eklezion, la unikan kaj universalan asembleon de la nova homaro.
Por Gen ĉi tiu estas alirpunkto, ĝi estas elirpunkto!
Aŭskultu mallonge nian amikan voĉon!
Jen: Gen-junuloj, membroj kaj reprezentantoj de nova generacio, orientataj al nova interpreto de vivmaniero: kion signifas ĉi tiu sinteno, ĉi tiu movado? Ho, vi ja bone scias tion!
Sed ni faras kune novan klopodon por kompreni, kaj ni diras: vi iradas por esploro. Esplori apartenas al juneco. Tuj kiam la konsciencokulo malfermiĝas antaŭ la sceno de la ĉirkaŭa mondo, maltrankvilo estiĝas en la animo de la junularo: ĝi volas scii, ĝi volas ĉefe provi; ĝi volas esplori.
Esplori, kion? Esplori, esplori!
Jen decida problemo: esplori, kion?
Ĉi tiu estas fatala elekto, kiu povas decidi pri via destino. Esplori, kion? Vi, niatempaj junuloj, havas jam negativan respondon, preskaŭ ribelan en via koro: ni

rifuzas, vi diras, la mondon, kia ĝi montriĝas al ni! Stranga fenomeno: ĉi tiu mondo, kiu prezentas al vi la plej belajn fruktojn, la plej perfektiĝintajn, la plej ĝueblajn en la nuntempa socievoluo, ne kontentigas vin, ne plaĉas al vi, kvankam oni kun facilanimo profitas pri ĝiaj atingaĵoj, komfortoj, mirindaĵoj, kiujn la moderna progreso metas je via dispono. Tamen iu sento de kritiko, de kontestado, eĉ de naŭzo haltigas vian esploradon en ĉi tiun direkton. Fakte, ĉi tiu estas direkto, kiu eligas vin el vi mem, kiu aliigas vian memsenton, ĉar funde ĝi estas materialisma, egoisma direkto. Ĉi tiu ne kontentigas vere la animon, ne solvas vere la esencajn kaj personajn vivproblemojn. Super ĉi tiu koncepto de nia ekzisto, koncepto hodiaŭ ofte reganta kaj filozofio de la publika opinio, pendas terura demando, kiel Damokla glavo: "Kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon, kaj ruinigus sian vivon?" (Mat. 16:26). Ĉi tiu estas la demando de Kristo, kiu ne vanigas la bonaĵojn de ĉi tiu tero tiel bela, riĉa kaj fekunda, sed klasifikas ĝian valoron, kiel malsupran al tiu de la vera vivo, kiun celas via elekto. Kia kaj kie?

Vi faris alian elekton. Pro tio vi nomiĝas Gen, nova generacio. Elekto, antaŭ ĉio, liberiganta. Liberiganta de la pasiva konformismo, kiu gvidas grandan parton de la moderna junularo; konformismo pri submetiĝo al la penso de la aliaj, al la laŭmodaj direktoj de la kulturo kaj de la moroj, al la amasmimetismo. Kiom da junuloj opinias, ke ili estas liberaj, ĉar ili forĵetis kutimojn kaj aŭtoritaton de la familia vivo, ne konsciante, ke ili falis en la ĉenon de grupa arbitreco, de sociala tendenco, de kolektiva ribelo! Ĉe la fundo de via psikologio estas persona kaj suverena agado el libera elekto. Ĉi tiu estas la unua motivo de via novaĵo, de via forto, de via ĝojo.

Kiu elekto? La elekto de Kristo.
Kiamaniere vi povis elekti Kriston kiel inspiranton de via ekzisto? Ho, ĉi tiu estas via sekreto. Ĉi tiu estas via individua historio, ĉi tiu estas certe la rezulto de renkontiĝo, flanke de via volo, de via vivinstinkto, kun Iu, ne nur pli forta ol vi, sed kun Iu, kiu tuj aperis al vi en sekreta fascino de beleco, de boneco, de ĉeesto, de interparolo, al kiu estis ekstreme racie sin fordoni, kvazaŭ al nekontraŭstarebla vero kaj senkompara feliĉo.
Kial tio okazis? Kiel? Ho, ĉiu gardu sian sekreton, kaj ĉiu tiun pripensu en si mem, kiel pravokiĝon. Ni nun mencias apenaŭ kelkajn tipajn formojn de ĉi tiu interna revelacio de Kristo, kiu venkis nin kaj faris nin mem venkantoj. Troviĝis, ni opinias, iu, kiu memoriĝis pri tiu Jesuo de sia infaneco; forlasita kiel ĉio alia, kio estis pritaksita en tiu unua epoko; oni opiniis lin forgesita, superita, malproksima; sed kiel iam lia ĉeesto, kvazaŭ de vojaĝkamarado, estis perceptita proksima kaj parolanta? "Kiu sekvas min ne iras en mallumo" (Joh.8:12), Li diris, ĝuste kiam mallumo kreskis dum vivirado.
Troviĝis iu, kiu gardis en sia memoro, aŭ pli bone, en sia kulturo, paliĝintan figuron pri Kristo, kiel pri unu el tiom da famuloj de la antikveco kaj de la historio; oni pensis al li kvazaŭ al statuo senmova, ŝtoniĝita de la pasinteco; poste - kiel ĉi tio okazis? - rigardante kun atento tiun fantoman statuon, oni vidis kun admiro kaj timo, ke ĝi estas viva, ke ĝi moviĝas kaj iras al la rigardanto kaj susuras simplan ravantan vorton: "Tiu estas Mi, ne timu!" (Mark.6:50).
Kaj iu alia, altirata de la sufero kaj de la homaj bezonoj, kliniĝis al la frato malriĉa kaj suferanta, aŭ al la popolo premata kaj humiligata, kaj aŭskultante ĝian ĝemon, komprenis, ke tio leviĝas de la homaj abismoj,

en kiujn Kristo descendis, kaj lia febla voĉo petas:"Donu al mi trinki" (Joh.4:7;19:28). Ankaŭ en ĉi tiu frata sento - ĉu ne vere? - superhoma vokiĝo por nova Generacio ofte aŭdiĝis. Kaj kiom da aliaj inter vi, per iu ekzemplo, per mistera harmonio inter vorto kaj vivo, pere de nova ĝojo, tiu de la karitato, "kiu havas plezuron en la vero" (I.Kor. 13:6), komprenis la inviton, plenumis la elekton, sentis en la atesto de la Spirito,la internan certecon de sia nova, supernatura vivo (Rom. 8:16).

Tiel okazis la renkontiĝo: Kristo kruciĝis kun viaj paŝoj; kaj pro tio hodiaŭ vi estas ĉi tie.

Jes, la renkontiĝo kun Li, Kristo Jesuo.

Sed kiu estas Kristo Jesuo?

Kia senlima demando!

Ni povas pensi, ke vi jam donis al vi mem respondon.

Jes, certe; se vi estas disĉiploj, eĉ filoj de la Eklezio vi scias, kiu estas la Sinjoro, Jesuo Kristo. Sed kion vi scias pri Li? kiel vi scias?

Sed aŭskultu nun ĉi tiun nian vorton, kiu proprigas al si tiun de Sankta Paŭlo: "Al mi, kiu estas malpli ol la malplej granda el ĉiuj sanktuloj, ĉi tiu graco estas donita, prediki al ĉiuj popoloj la bonan anoncon de la neesplorebla riĉo de Kristo..." (Ef.3:8).

Unue, en si mem, Kristo estas la dia Vorto enkarniĝinta; Kristo, por ni estas la Savanto de l' homaro.Du oceanoj: la dieco de Jesuo Kristo kaj la misio de Jesuo Kristo en la mondo. Provu taŭge esprimi ĉi tiun unuan esencan aspekton de la Dia Persono, vivanta en la senfina kaj transcenda naturo de la Eterna Vorto de Dio kaj vivanta en la homo Jesuo, naskiĝinta de la Virgulino Maria per la Sankta Spirito; kaj poste esprimi ĉi tiun duan aspekton, nome lian eniĝon en nian historion, en nian destinon, en nian vivon, en nian intiman inter-

rilaton (v. Bar.3:38) ... kaj vi sentos vian komprenkapablon superbordiĝi en ekstazon de saĝeco, de vero kaj mistero, kiu klopodos vastiĝi laŭ ĉiuj eblaj dimensioj, por verŝiĝi poste en la amon, kiu superas ĉiun scion (v. Efes.3:18;19). Al ni ŝajnas, ke vi, "Focolarini", alfrontis ĉi tiun duoblan problemon: Kiu estas Kristo? kaj kiu estas Kristo por ni? Kaj jen, la fajro de la lumo, de l' entuziasmo, de la agado, de l' amo, de sindono kaj de ĝojo ekbrulis en vi, kaj el interna nova pleneco vi ĉion komprenis, Dion, vin mem, vian vivon, la homojn, nian tempon, la centran direkton kiun vi devas asigni al via tuta ekzisto.

Jes, ĉi tiu estas la solvo, la ŝlosilo, la formulo antikva kaj nova. Vi antaŭsentis ĝin, kaj prave vi donis al via movado difinon: "Nova Generacio", Gen!

Do, tre kara Junularo Gen!

Renkonti, koni, ami, sekvi Kriston Jesuon!

Ĉi tiu estas via programo. Ĉi tiu la sintezo de via spiriteco, kiun vi, celebrante la Jubileon de la Sankta Jaro, intencas reaserti en viaj konsciencoj kaj traduki en vian vivon.

Kun du konkludoj. La unua: por koncentri en centran kaj fekundan penson, la sekreton de via Movado, klopodu havi ĉiam Jesuon kiel Majstron. "Unika" diris pri si mem Jesuo al siaj disĉiploj, "unika estas via Majstro", Kristo (Mat.23:8). Havu la gracon kompreni ĉi tiun veron! Ĝi estas la lumo de la penso kaj la lampo de la vivo. Jesuo Majstro!

Kaj poste la dua konkludo, kiun same ni aŭskultas el la buŝo de Jesuo: "Vi ĉiuj estas fratoj". Havu la saĝon kaj la kuraĝon alveni al ĉi tiu konkludo, kiu estas la radiko de la kristana socio. Estas ofte preskaŭ nekompreneble rimarki, kiel multaj, kiuj asertas, ke ili estas sekvantoj de la evangelio, estas nekapablaj dedukti el la Evangelio mem socion bazitan sur amo. Ili ver

ŝajne timas, armitaj per la nura Evangelio, ke ili estas malfortaj, abstraktaj, netaŭgaj por la granda misio aliigi homojn al fratoj; kaj ili opinias trovi principojn kaj aldonajn fortojn priserĉante ilian efikon ĉe materialismaj kaj ateismaj skoloj, kiuj eltiras sian logikon kaj energion el luktado de homoj kontraŭ homoj. Tiuj estas kontraŭdiraj surogatoj por eduko de la moderna mondo al justa kaj frata socio.

Vi, nova Generacio, estu fidelaj kaj koheraj. Se vi elektis Kriston kiel vian Majstron, fidu al li kaj al la Eklezio, kiu kondukas kaj prezentas lin al vi. Montru per agadoj la efikan forton de la karitato, de la socia amo, enkondukita de la Majstro. Ĉi tiu estos sendube sperto nova kaj naskanta pli justan kaj pli bonan mondon. Ĉi tio estos forta sperto: ĝi postulos rezistadon, oferon, verŝajne heroismon; ĝi postulos ke vi ankaŭ estu la fortikaj kaj sindonaj Cirenanoj, kiuj submetas siajn ŝultrojn por porti la krucon de Jesuo. Jes, vi devos ankaŭ suferi kun li, kiel li, por li! Sed ne timu, Gen! estu fidemaj! Vi laboros favore al via savo kaj al tiu de la moderna mondo. Kaj ĉiam, kiel hodiaŭ , vi estos bonaj kaj feliĉaj!

- - - - - - - - - - - -

La parolado de la Papo al le Gen-junularo estis adresita unue al la ĉeestantaj junuloj, sed ankaŭ al ĉiuj kristanoj, kiuj konas Jesuon kaj iam aŭskultis lian vokiĝon al amo, kredo, espero. La amasa kredatesto de dudekmil junuloj en S. Petro estas tiel frapanta, ke ni volis reeĥigi ĝin al niaj legantoj.

Kio estas Gen? Nenio alia ol la konkreta aplikado de la evangeliaj vortoj: "Amu vin reciproke, kiel mi amis vin". Tion pripensis iu junulino, Klara Lubich, rigardante ĉirkaŭ si la terurajn sekvojn de la milito en Trento post la ŝtormo de bombardadoj; kaj ŝia sentema ko-

ro deziris doni helpon al aliaj, laŭ la vortoj kaj la ekzemplo de Jesuo. Tuj aliaj kuniĝis al ŝi, kiu kuraĝe proklamis: "Ni devas doni ĉiujn niajn fortojn por helpi la fratojn: ĉiujn niajn fortojn, eĉ la vivon, kiel Jesuo". Post kelkaj monatoj ili estis jam 500 personoj. En la ĵusa aŭdienco de la 5a de marto ili montriĝis kiel internacia movado, kiel nova generacio, preta travivi la evangelion en la nomo de Kristo kaj de la Eklezio.

## ROMA ESPERANTA VOĈO

## N° 137

ALIĜIS AL LA 36a IKUE-KONGRESO EN ROMO :

123 Vogel G.
124 " E.
125 Mudrak W.
126 Vincent J.
127 Wieczkorek E.
128 Jeglorz R.M.
129 Debrowski J.
130 Jedrzejczyk M.
131 Szamburski J.
132 Wal J.
133 Miziolek W.
134 Ambros L.
135 Więcek I.
136 Giedroyć-Fick Z.
137 Radziewicz-Winnicka J.
138 Cetskà M.
139 " T.
140 Gohla T.
141 " A.
142 Gorecka H.
143 Wieczorek G.
144 Gucwa A.
145 Klopocka Z.
146 Iwanska A.
147 Dusza H.
148 Forycki R.
149 Despiney R.
150 Schmidt L.H.
151 Brady P.
152 Cerutti G.
153 Meyer A.
154 Laba M.
155 " R.
156 Kosieniak L.

157 Smelczynska M.A.
158 Moser J.
159 Venezia F.
160 Chapellier J.
161 Tambor J.
162 Jez P.
163 Kucewicz Z.
164 Boklak D.
165 Drobinska T.
166 Jasinska A.
167 Ksiezopolska Z.
168 Heine E.
169 Gawrys U.
170 Andrejewski L.
171 Neudaker J.
172 Szanser I.
173 " M.
174 Kasimierz W.
175 Strzelcowa H.
176 Ratajeczyk A.
177 " J.
178 Ksiazek J.
179 Biedulska A.
180 Sliwinski K.
181 Foltvnowicz J.
182 Eder H.
183 Martynienko Z.
184 Melion J.
185 Miecznikowska-Z. M.
186 Ceccarelli-M.C.


Ĝis nun: 186, el kiuj:

104 el Pollando
20 el Romo
34 el aliaj italaj urboj
5 el Nederlando, Germanujo, Francujo
2 el Jugoslavio, Hungarujo, Belgujo, Aŭstrujo, Usono
1 el Ceĥoslovakio, Hispanujo, Norvegujo


.........................................................

## BAZILIKO S. MARIA LA PLEJ GRANDA

Unu el la kardinalaj punktoj de nia Jubilea Kongreso en Romo estos sendube la vizito al la Baziliko Sankta Maria la Plej Granda. Sed verŝajne estos konvene viziti ĝin dum pli taŭga momento, por ĝui la ne malmultvorte priskribeblan ravon de ĉi tiu preĝejo, kiun la devoteco de la roma popolo dediĉis al la nomo de sia ĉiela protektantino.



La absido kaj obelisko - sube la fasado.



Honore al la bildo de la Patrino de Dio, tre antikva bizanca ikono, estis konstruita sur la Eskvilina monteto unue malgranda kapelo, poste iom pli granda preĝejo, fine la vasta mirinda baziliko, S.Maria Maggiore, kiun hodiaŭ ni povas kontempli. Ĉi tiu bildo estis, laŭ kelkaj historiistoj, la sama ikono, kiun papo S. Gregorio procesie portis tra la romaj stratoj en 590, preĝpetante kun la tuta popolo ĉesigon de la terura pesto, kiu falĉis sennombrajn viktimojn en Italujo kaj preskaŭ dezertigis Romon. Dum tiu pentofara procesio, la papo, levante la okulojn, vidis antaŭ si, super la kulmino de la Adriana maŭzoleo, anĝelon remetanta sian glavon en la ingon. Tiu vizio estis por li kaj la roma popolo anonco pri la fino de la pesto. Fakte, de tiu momento ĉi tiu rapide estingiĝis. De tiam la tombo de imperiestro Adriano aliigis sian nomon al "Castel Sant'Angelo" (Kastelo S. Anĝelo) kaj la Maria bildo nomiĝis: "Salus populi romani" (savo de la roma popolo). Kaj de tiam papoj kaj kardinaloj donis ĉiujn zorgojn por la sanktejo de Maria.

Sed la fervoro de la kredantoj por la Sanktaj Lokoj, jam famigita de Helena kaj de Konstanteno, revigligita de Sankta Hieronimo, sankta Paŭla kaj de tiom da pilgrimantoj, kiuj forlasis Romon por vivi ĉe la sankta groto de la Kristnasko, instigis ekde la unuaj jarcentoj priserĉi tie ĉiujn eblajn relikvojn. Al la Baziliko S. Maria oni portis ne nur materialojn elfosigitajn en la sankta Groto de Betlehemo, teron kaj ŝtonojn, sed eĉ la restaĵojn de la sankta lulilo de Jesuo, tiel ke ankaŭ S. Hieronimo plendis, ke oni kaŝis aŭ aliigis ĉiujn memoraĵojn tiel sanktajn per marmoraj aŭ arĝentaj homaj verkoj. Ne estas mirinde, ke baldaŭ ĉirkaŭ tiu elstara relikvo, kiu estis taksata kiel la dua plej valora riĉaĵo de la maria baziliko, oni volis rekonstrui subtere la sanktan groton per la materialoj portitaj el la Sankta

Lando, tiel ke post kelkaj jarcentoj oni povis kredi, ke ĉi tiu fariĝis pli "vera" Groto en kiu naskiĝis Jesuo, ol tiu de Betlehemo.

Fakte, kvankam oni ne povas hodiaŭ dokumenti, ĉu tiuj restaĵoj apartenis al la originala lulilo de Jesuo, aŭ tute simple al iu ĝia reproduktaĵo, tamen oni agnoskis, ke tiuj lignopecoj devenas efektive de la Palestinaj sikomoroj. Pro tio jam de la 7a jarcento oni vokis la Bazilikon: Sankta Maria de la Lulilo. Multaj papoj ĉiam konkuris por vastigi, ornami kaj riĉigi la bazilikon. Memorinda estis la entrepreno de arkitekto Fontana, kiu sub Papo Siksto 5a - la papo, kiu ne toleris kontraŭstarojn - detranĉis ĉirkaŭe la tutan subteran groton de la Naskiĝo kaj per potencaj pulioj kaj ŝnuregoj, tirataj de ĉevaloj kaj homoj, sukcesis eltiri de sia unua loko la tutan groton kaj deponi ĝin je distanco de 15 metroj, kie Papo Siksto ordonis, ke stariĝu nova granda kapelo.

Nur ĉe la 10a aŭ 11a jarcento la unua bazilika titolo estis anstataŭigita de alia: "Baziliko de Papo Libero" aŭ "S.Maria de la Neĝo". Ĉar iom post iom naskiĝis kaj firmiĝis pia tradicio, laŭ kiu la Madono aperis al Papo Libero kaj al patricio Johano, ordonante al ili, ke oni konstruu templon sur loko kie, la postan tagon, ili trovos neĝon. Laŭ la historiaj dokumentoj tamen, la unua vera baziliko estis konstruita de Siksto 3a, kiu je la 5a de aŭgusto 433 ĝin konsekris sur la Eskvilina monteto. El tiu verŝajna legendo restis ĝis hodiaŭ la ĝenti la rito de faligado de blankaj florpetaloj dum la solena celebrado de la 5a de aŭgusto, festo de la Madono de la Neĝo. El lanterno de la kapela kupolo, la petaloj papiliume descendas kiel Maria beno sur la fidelularon.

Ni vizitu la belan bazilikon, dediĉitan al Maria. Sed, antaŭ ol eniri en la preĝejon, ni rigardu la placon. Je la centro elstaras la marmora kolono, unika restinta el

la roma Maksenca baziliko detruita de tertremo. Ĝin transportigis ĉi tien Paŭlo 5a. La bronza Virgulino, kiu leviĝas sur ĉi tiu kolono estas verko de la franca skulptisto Berthelot. Dekstre de tiu, kiu rigardas la fasadon, estas la romanika kampanilo de la 11a jarcento. Ĝi estas la plej alta el la multaj samstilaj de Romo. Kontrastantaj kun ĝi sed ekvilibrantaj la ensemblon estas la du kupoloj de la kapeloj Siksta kaj Paŭla (16a kaj 17a jarc.).

La fasado estas de Ferdinando Fuga, kiu en 1743 aliigis profunde la antaŭan aspekton karakterizitan de la mozaikoj, kiuj ornamas la vandon. Ili nun estas iom pli kaŝitaj pro la aldonitaj loĝioj; sed kompense ŝirmitaj kontraŭ la malbona vetero. Belege aspektas tiuj mozaikoj dumnokte pro la elektra lumo, kiu briligas iliajn riĉajn kolorojn. Ili montras majestan Kriston benantan (verkon de la 13a jarcento) kaj epizodojn de la miraklo de la neĝo.

Ĉirkaŭirante la bazilikon, ni alvenas al Placo Eskvilino, kie leviĝas la egipta obelisko, prenita de Siksto 5a el la maŭzoleo de Aŭgusto. Impona estas la ŝtuparo de Carlo Rainaldi (17a jarc.), kiu kompletigis tiun antaŭan de la 13a jarcento.
Sed ni revenu al la ĉefa fasado.

Kvin pordoj estas antaŭ ni: la unua maldekstre estas la Sankta Pordo, kiu nur dum la jubileoj malfermiĝas (v.foton en K.S.-1,p.12). La centra el bronzo, kun belegaj skulptaĵoj, estis donaco de Pio 12a. Dekstre la statuo de Filipo 4a, hispana reĝo, memorigas, ke post la grandaj donacoj faritaj al la baziliko ekde la 16a jarcento, Hispanujo estas ĝia protektanto.

Sed tuj kiam ni trairas la pordon, ni rimarkas, ke ĉi tiu estas antaŭkonstantena baziliko, kiu, dum siaj multaj aranĝoj konservis tamen la originalajn planon kaj murojn. Ĝi ĥavas tri navojn apartigitajn per 36 ionikaj

kolonoj. Brilas super ĉi tiuj la riĉega plafono laŭ fakoj, el ligno orumita per la unua oro portita el Ameriko de Kristoforo Kolumbo al la hispana reĝo, kiu donacis tion al Papo Aleksandro 6a. Ĉi tiu plafono estas konsiderata ĉefverko de la Renesanco en Romo. Dumla ĵus pasinta jaro oni volis renovigi ĉiujn trabojn de la supra tegmento, kiuj havis jam preskaŭ kvar jarcentojn, per novaj el ferbetono. Okaze de tiuj gravaj kaj longaj laboroj (dum kiuj neniam la baziliko estis fermita al la fideluloj) oni povis konstati, ke tiuj traboj estas ankoraŭ tre bone konservitaj.

La brilo de la plafono respondas al tiu, kvankam pli modesta, de la mozaikoj de la planko, senkompara verko de la Cosmati-artistoj (13a jarc.).

Sur la arkitravo de la kolonoj disvolviĝas la mirinda serio de mozaikoj, kiuj apartenis al la unua preĝejo. Temas pri 27 valoregaj mozaikoj, kiuj iras de la dua jarcento ĝis la komenco de la sesa kaj ilustras historiojn de la Antikva Testamento. Ĉi tiuj gvidas la rigardon al la "Triumfa Arkaĵo" kaj al la absido, kaj praviĝas la diron: "S.Maria la Plej Granda estas tute el oro". Fakte, ambaŭ estas entute kovritaj per belegaj vastaj mozaikoj, en kiuj oni kalkulis pli ol 200 nuancojn inter la diverskoloraj vitraj kubetoj kiuj, sur ora fono, desegnas la figurojn. Aŭtoro de la desegnoj estas la miniaturista franciskano Jakobo Torriti (+ 1292), kiu plenumis la laborojn menditajn de kardinaloj Jakobo kaj Petro Colonna.

En la centro de la Triumfa Arkaĵo, celebranta la Efezan Koncilion, kiu solene proklamis Marian "Teotokos" (Patrino de Dio), oni legas la nomon de la Papo, kiu ĝin ordonis: Siksto 3a (unua duono de la 5a jarcento). Oni vidas en la du ekstremoj, alte, la du anunciaciojn: al Maria kaj al Jozefo; kaj la Epifaniojn aŭ manifestiĝojn de la Savanto. Poste: Herodo ricevas la Reĝojn; la

senkulpaj infanetoj surbrake al siaj patrinoj; malalte la urboj Jerusalemo kaj Betlehemo, kiuj malfermas siajn pordojn al la ŝafidoj, t.e. la fideluloj.

Malantaŭ la arkaĵo jen la absido, gloro de koloroj kaj de oro. Grandega "Kronado de la Virgulino" ĉirkaŭata de anĝeloj kaj sanktuloj, je la centro; malalte, la "Dormitio" (morto dum mallonga tempo) de Maria, priplorata de la apostoloj, dum Jesuo akceptas surbrake ŝian animon, kaj scenoj de la Anunciacio kaj Kristnasko, de la adorado de la Reĝoj kaj Prezentado; fine du scenoj pri S. Hieronimo kaj Matio, kies relikvoj estas kaŝitaj sub la granda altaro, kaj en la trezorejo de la baziliko.

La papa altaro, rezervita ĝis antaŭ malmultaj jaroj nur al la celebranta Papo, memoriganta, kvankam pli modeste, la "konfesan" altaron de S. Petro, estas la vera centro de la baziliko. Oni povas admiri ĝian riĉecon kaj harmonion, kvankam la baldakeno subtenata de kvar porfiraj kolonoj, starigita de Fuga, malebligas la rigardon de la tuta ensemblo de l'absido kaj de l'Arkaĵo.

Fine, sub ĉi tiu estas la kripto de la Lulilo de Jesuo, gardata en la urno el kristalo kaj arĝento, de Valadier. Ĉi tiu malgranda kapelo, desegnita kaj ornamita de arkitekto Vespignani (+1882) kaj de pentristo Podesti (1895), estas tamen per si mem vera trezoro. 74 malsamaj marmoroj bele harmoniiĝas inter si. Vota lampo, pli alta ol la aliaj, ĉiam ardanta, estis donaco de Patriarko Atenagoro, kiu je 28 de oktobro 1967 vizitis ĝin. Antaŭ la urno estas statuo de Papo Pio 9a, kiu inaŭguris la kapeleton (17 aprilo 1864), kaj kiun Leono 13a volis figurata preĝanta, kvazaŭ invitanta al meditado pri la mistero de la enkarniĝo de la Filo de Dio.

Kun multaj aliaj valoraj relikvoj kaj trezoroj de la romaj preĝejoj, kutime kaŝitaj al la rigardo, ankaŭ ĉi tiu, nur pro la Sankta Jaro estas daŭre eksponita; ĉar ekster ĉi tiu okazo ĝi estas videbla nur je la 25a de ĉiu mo

nato, kaj procesie transportata tra la preĝejo en la kristnaska nokto.

Kaj nun ni vizitu la du kapelojn, situantajn dekstre kaj maldekstre de la ĉefa altaro, portantajn la nomon de la papoj, kiuj konstruis ilin, Siksto 5a por la unua, kaj Paŭlo 5a Borghese por la dua: "ili estas la orelringoj de la Madono", diras la Romanoj.

La Siksta estas ankaŭ la kapelo de la tre sankta Sakramento. Ĝi aperas kiel vera greka-kruca preĝejo kun siaj kapeletoj, sakristio, centra altaro kaj kupolo super ĝi. Sub la altaro hodiaŭ ne plu vidiĝas la Groto, kiun transportis ĉi tien la arkitekto de Siksto 5a; de kiam la relikvoj de la Sankta Lulilo estis reportitaj sub la ĉefan altaron, ĉi tie oni admiras kelkajn ravajn restaĵojn de la Sankta Kripo skulptita de Arnolfo di Cambio: S. Jozefo, la azeno, la bovo kaj du Reĝoj. En la Siksta kapelo estas ĉe unu flanko la monumenta tombo de Siksto 5a, ĝia konstruinto; kaj ĉe la alia, de Papo S. Pio 5a, la reformiganto pri la misalo, pri la breviero, la ordonanto de la "Katekismo de la Trenta Koncilio", kaj fine, la Papo de la Rozario (Lepanto, 1571). Ĉe la eniro de la Siksta, du kapeletoj, dediĉitaj unu al S. Hieronimo, kiu vivinte kaj verkinte 34 jarojn ĉe la Kripo de Jesuo en Betlehemo, estis transportita post sia morto ĉe la Lulilon de Jesuo en Romo; alia kapeleto estas dediĉita al la Sanktaj Senkulpaj Infanoj mortigitaj de Herodo.

Sed la plej admirinda kapelo estas la Paŭla aŭ Borghese-kapelo, verŝajne la plej bela en la mondo, dediĉita al la Madono "Salus Populi Romani", maldekstre de la ĉefa altaro. Ĝi estis konstruita de Flaminio Ponzio, simetrie al la Siksta, laŭ komisio de Papo Paŭlo 5a. La plej famaj artistoj de tiu epoko konkuris por ornami ĝin. Sur la altaro de la Madono, valorega pro la

jaspoj, agatoj, ametistoj kaj ĉefe lazurŝtonoj, leviĝas la orbronzaj anĝeloj, kiuj subtenas la bildon de la Madono. Oni povas admiri la bareliefon el bronzo, de Stefano Maderno, sur la frontispico de la altaro, kaj la pentraĵon de Giuseppe Cesari, super la altaro; de Ludoviko Cardi, nomata Cigoli en la kupolo, de Guido Reni en la lanterno, ktp. ktp. Ankaŭ ĉi tie du grandaj tombaj monumentoj de Papo Klemento 8a kaj de Paŭlo 5a.

Revenante, post nia vizito, laŭ la maldekstra flanko de la baziliko, oni estas kvazaŭ devigataj halti momenton, kiel faras ĉiuj romanoj, antaŭ la bela "Reĝino de la Paco", donita al la baziliko de Benedikto 15a en 1918. Ŝi levas la maldekstran manon kvazaŭ por ordono kaj defendo kontraŭ la teruraj danĝeroj de la milito (ĝi estis konstruita dum la unua tutmonda milito), dum la dia Infano prezentas olivarban branĉeton.

Denove pasante al la dekstra flanko, antaŭ ol ni eliros, ni devas viziti la Baptejon, kie Petro Bernini (sepultita en ĉi tiu baziliko) skulptis, inter 1607 kaj 1610, la grandan bareliefon prezentanta la Ĉielenprenitan. El porfira vasko, iam apartenanta al la Vatikanaj Muzeoj estas la bapta Fonto.

En ĉi tiu baziliko, kiun oni povas facile atingi el ĉiuj direktoj, pro ĝia centra pozicio en la urbo kaj ĝia proksimeco al la stacidomo, la religiaj servoj estas intensaj. Ĉi tie okazas tre ofte solenaj liturgiaj ritoj, ankaŭ ekumenaj, kun grandaj pilgrimantaj grupoj el multaj nacioj. La muzika Libera Kapelo per si mem altiras ĉiujn, kies spirito nutriĝas ĉe la riĉaj fontoj de la sanktaj misteroj, celebrataj sur la papa altaro. Sedne malofte ĝi estas anstataŭata per la polifonia ĥoro de junuloj aŭ fratinoj, kiel ĉe la fino de decembro kun 1500 germanaj pilgrimantoj - ĉiuj knaboj aŭ junuloj - aŭ okaze de ĝeneralaj kapituloj aŭ de kanonigoj, kiuj koncen-

tras en Romo ĉiunaciajn gereligiulojn.

Ankaŭ la Penitencieraj patroj, kiuj disvolvas sian ĉiutagan spiritan laboron en la 24 konfesejoj de la Baziliko per multaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ per la esperanta, celebris kun aparta soleno sian jubileon je la 24 de februaro.

En ĉi tiu baziliko, jam de 1390 asignita por la jubilea indulgenco, kie la Papoj celebradis dum jarcentoj la plej solenajn diservojn, la katolikaj esperantistoj ĝuos ĉijare je la 15 de aŭgusto unu el la plej spirite riĉaj momentoj de sia vivo, kaj aŭskultos la vivan voĉon de iu Papo, kies grandeco pli kaj pli aperos en la historio.

ABONIS K.S.-on 1975 (3a listo):

Bolonjo: I.Albertazzi; Cesena (FO): E.Bissi; Ferrara: L.Miccoli; Grosseto: M.Casoli; Milano: P.Mamone; Padovo: H.Menegazzo; C$^{o}$. Minnaja; Rimini (FO): C. Ferazzini; C.Ceccarelli-M.; Rho (MI): N.Minnaja; Romo: G.Barbalace; G.De Carolis; L.Di Tocco; Udine: A.Blasoni; Aŭstrujo: W.Mudrak; Belgujo: E.Paesmans; Britujo: L.Minio-Faluello; Francujo: R.Despiney; J.Chapellier; Germanujo: G.Vogel; J.Moser; Hispanujo: I. Gaston; Nederlando: J.Fisher; Pollando: E.Wieczkorek; J. Szanser; J.Szamburski; J.Wal; W.Miziolek; L.Ambros; I.Wiecek; Z.Giedroyc-Fick; I.Radziewicz-W.; M. Chetska; T.Gohla; H.Gorecka; A.Gucwa; Z.Klopocka; A.Iwanska; H.Dusza; F.Debrowski; M.Smelczynska; A.Meyer; B.Sobol; M.Laba; P.Jez; J.Tambor; S.Pasieka; T. Drobinska; A.Jasinska; W.Kazimierz; H.Strzelcowa; A.Ratajczyk; J.Ksiazek; A.Biedulska; K.Sliwinski; J.Foltynowicz; H.Eder; Z.Martynienko; J.Melion; M.Miecznikowska-Z.; A.J.Pietryka; Z.Ksiezopolska; E.Heine; U.Gavrys; L.Andrzejewski; J.Neudecker.

Entute: 324.

BELA SERIO DA 6 BILDKARTOJ pri Romaj vidaĵoj, desegnita de Ark. s-ano Salvatore Messina estas jam preta por nia Kongreso (£.250). Ankaŭ la moderna kongresinsigno, tre ŝatata de tiuj, kiuj povis vidi ĝin, estos bela memoraĵo de la Esperanto-Kongreso en la Sankta Jaro 1975.

PRO LA GRAVA ALTIGO de la poŝtafrankoj, je duobla, kaj baldaŭ je triobla kosto, ni avertas niajn legantojn, ke ni devos redukti draste nian korespondadon ĝis kazoj de nepra neceso. Ni petas komprenemon!

TIUJ, KIUJ VOLAS PAGI AL NI, preferu uzi poŝtĝirkonton adresitan al ni, ĉar tiu estas pli malmultkosta pagmaniero. Pagante per bankĉeko, oni aldonu mil lirojn pro bankaj elspezoj.

---------

LA JUBILEAN INDULGENCON oni povas gajni laŭ la samaj jam konataj kondiĉoj, krom per la vizito al unu el la kvar Patriarkaj Bazilikoj, ankaŭ per pia vizito al unu el jenaj Romaj katakomboj:

1 - Katakomboj de S. Kalisto (Via Appia Antica, 110); 2 - Katakomboj de S. Sebastiano (Via Appia Antica, 132); Katakomboj de S. Domitila (Via delle Sette Chiese, 282); Katakomboj de S. Pankraco (Piazza S. Pancrazio, 5/d); Katakomboj de Priscila (Via Salaria 430); Katakomboj de S. Laŭrenco (Piazzale S.Lorenzo, 3). La indulgencon oni povas akiri ankaŭ en la Bazilikoj konstruitaj interne de ili, aŭ sur la diritaj katakombaj tombejoj.

Naciaj pilgrimantoj povas akiri la jubilean indulgencon ankaŭ per vizito al sia nacia preĝejo en Romo.

---------

## REVENO AL PREĜADO

(Karesmo estas ĉefe preĝtempo. Prema alvoko al preĝado estas la paŝtista letero de Moŝ. Mosconi, ĉefepiskopo de Ferrara. Ni transdonas el ĝi mallongan parton).

"La Sankta Jaro estas alvoko al konvertiĝo, al renoviĝo, al repaciĝo; ĝi estas pro tio alvoko al preĝado. Ĉar estas la preĝo, kiu transformas la animojn de tiuj, kiuj preĝas kaj de tiuj, por kiuj oni preĝas. Tri apartajn celojn proponis la Vikario de Kristo: paco en la mondo; karitatfaroj helpe al la suferantaj fratoj; religiaj vokiĝoj, ĉar la homoj ĉiam bezonos pri sanktaj diservistoj. Necesas do interna aliiĝo, vera kaj aŭtentika spirita konvertiĝo; necesas pliigo de karitato, kiu inklinu nin je fratiĝo favore al ĉiu homo kaj je disdono de niaj havaĵoj al tiuj, kiuj suferas; necesas konscio de la interna vokiĝo kaj konsekriĝo, kaj granda interna forto por respondi al Dio dum ĉi tiu tempo tiel devojiganta.

Sed kiu povas transformi animojn krom Dio? Kiu povas fortiri nin kaj la aliajn de la sklaveco de nia egoismo, de nia timo antaŭ nia sindono? Kiu povas transirigi homojn de malamo al amo kaj ofero? Neniu alia ol Dio; kaj ni povas nur peti tion kun konstanta kaj fido-plena insisto. Ni devas preĝi.

Ni devas aparte petpreĝi hodiaŭ por la Eklezio.

Ni legis du preĝojn por la Eklezio, kiuj ŝajnas al mi ekstreme signifaj kaj aktualaj, kvankam unu el ili estas pli ol kvarcentjara kaj la alia sesjara.

La unua estas de Erasmo el Roterdamo, dum la kulmino de la protestanta ŝtormo. Erasmo sin turnas al Je-

suo kaj diras al li: "Vidu, bona paŝtisto, kiom da lupoj invadis vian gregejon, kaj ĉiu el ili proklamas: Kristo estas ĉi tie, Kristo estas ĉi tie; tiel ke estas trenataj en eraron, se tio eblus, eĉ justuloj. Vidu per kiom da ventoj, per kiom da ondegoj kaj tempestoj estas disskuata via ŝipeto, ekster kiu neniu sin savas. Kio restas krom tio, ke ni ĉiuj, englutitaj per ondegoj, pereos? Ĉi tiun tempeston kaŭzis al ni niaj malbonaĵoj; ni tion sciias kaj agnoskas".

Maldolĉa preĝo estas ĉi tiu, sed amoplena alvoko, kiun hodiaŭ ni povas ripeti, ĉar la Eklezio ankoraŭ suferas, estas kontestata, estas batata.

Sed kie homoj povos trovi certan gvidon krom en la Eklezio, Katolika, Apostola, Roma?

La freŝdata "Itinerario verso Dio" (itinero al Dio) de senatano Ettore Vallauri (eldonita de Piero Stefani) memorigas je 1 septembro 1968 "kun tiom da timsento kaj malĝojo" la eventojn de la mondo kaj de la Eklezio en tiu epoko, en kiu Paŭlo 6a devis admoni la ekleziajn delegitojn de Katholikentag el Heslando kaj la katolikan amerikan asocion por renovigo de la animgvidado, kiuj kuraĝis aserti, ke "la ĵusaj (tiutempe) Encikllkoj pri Eŭkaristio, fraŭleco kaj naskiĝoj enkondukis malkonsenton en la Eklezion". Je la 8a de decembro de la sama jaro 1968 oni legas: "Papo Paŭlo 6a esprimis hieraŭ sian ĉagrenon, sian personan malĝojon pro la perturbaj eventoj en la Eklezio kaj parolis pri ĝia memdisbato (p. 83); kaj el la kredanta koro leviĝas la preĝo: Helpu nin, Sinjoro, ĉar granda estas malcerteco de animoj en via Eklezio kaj en la mondo, kiu pretigas sian katastrofon. Vi ĉeestas, kaj via kruco kunigas nin al viaj suferoj kaj al la ĝojo de ilia akcepto por la savo de la mondo. Kompatu nin kaj via justeco estu malsevera pro la fideleco de viaj sanktuloj. Ho apostoloj Petro, Paŭlo, Johano, jen vi havas nian propetan preĝon. Via Eklezio estas la

nia, kaj via martireco estas la nia".

Ĉi tiu preĝo devas leviĝi el nia koro pro la zorgo, kiun ni havas por la Eklezio kaj por la mondo. ...

En la mondo ĉiam troviĝas sindonaj animoj kaj bonvolaj homoj, kiuj zorgas por la bonfaro de siaj fratoj. Por ĉiuj neniu invito estas pli premanta ol ĉi tiu: invito al preĝado. Tiu, kiu estas konsekrita al Dio, kiu donis sian vivon al la Sinjoro, tenu forte sian dediĉon per sen interrompa preĝo.

Junuloj, kiuj avidas trovi rimedon por nova kaj justa mondo, memoru, ke ĉi tiu ebleco de vera renoviĝo troviĝas nur en Dio: kaj ke ĝi devas esti petata per preĝado, por ke ĝi fariĝu travivata realo.

Niaj samtempanoj, kiuj estas malkvietaj pro necerteco kaj malĝojo, certecon kaj ĝojon trovos en preĝado.

Tiu, kiu kun profunda fido volas labori por la savo de tiom da niaj fratoj, devas ekiri de la preĝo kaj daŭri en ĝi.

Preĝo interkomunikigas nin kun Jesuo: la unika Savanto, kiu neniun disrevigas kaj forlasas, kiu atendas nin kaj priserĉas nin, kiu respondas al ĉiu nia justa demando, kiu donas kontentigan solvon al ĉiu nia preĝo, ĝojon kuniĝi kun li en la vojo, en la pleneco de la lumo, ĝis la perfekta ravanta ĝuo de paco, kiu neniam ĉesos".

KOLONIO - Katolika Virina Asocio de ĉefdiocezo de Kolonio iniciatis gravan helpon favore al virinoj atendantaj infanon, kiuj pro ĝi ricevos senpagan libertempon ĉe aparta ripozdomo en Rhoendorf, ĉe Bonno. La katolika Asocio celas per ĉi tiu asisto helpi konkretmaniere virinojn akcepti sian novan kondiĉon. Tiu Asocio administras en la sama diocezo plurajn helpocentrojn por patrinoj solaj.

SANTIAGO DE KOMPOSTELO - 756 grupoj da fideluloj sumantaj kune pli ol 7C00 personojn, profunde pri-

studis la skemon pri laikapostolado, kiun la Galicia Sinodo pritraktos dum unu el siaj proksimaj sesioj. La skemo estis jam pristudita de ĵusa studkunveno inter la diocezaj reprezentantoj de la sama Sinodo kun pluraj gvidantoj de la laikaj regionaj movadoj. Inter la punktoj akcentitaj en tiu kunveno estas la ebleco, ke tiu mobilizado favore al la menciita skemo estigu starigon kaj funkciadon de paŝtistaj Konsilioj en la parokoj.

.......................................................

Radio Roma-Esperanto = C.P. 320 = I-00100 Roma (Italujo)
Redaktoro: D-ro Antonio DE SALVO, C.P. 4917.
I-00100 Roma Appio (Italujo)
Kunlaboras: D-ro Cesare Arieti, D-ino Vera Di Tocco, F-ino Mirella Merlani.

La programo okazas ĉiun dimanĉon, de la 21a ĝis la 21a horo kaj 20 minutoj, laŭ mezeŭropa tempo, sur ondlongoj:

metroj 30,90 41,24 50,08

La programo temas pri "Novaĵoj el Italujo", "Kuriero de Esperanto" kaj "Leterkesto".

La Itala Radio en Esperanto volonte akceptas informojn, sugestojn rimarkojn koncerne aŭdeblecon kaj enhavon de siaj programoj. Pro tio, ĉiu aŭskultanto bonvolu skribi tiucele al ĝi, akcentante sian interesiĝon al la itala kulturo. Kaj eĉ esperantistoj loĝantaj en landoj, kie la voĉo de Radio Roma en Esperanto ne alvenas, petu, ke oni elsendu ankaŭ en aliaj tagoj aŭ horoj aŭ per aliaj ondlongoj, tiel ke la programo atingu ankaŭ tiujn landojn.

Ĉiu petu senpagan ekzempleron de la ilustrita programbroŝuro.

Oni skribu al la oficiala adreso:
Radio Roma, Esperanto, C.P. 320; I-00100 Roma, Italujo

.......................................................